



Protokolo de la Estrar-kunsido de ELI: 4-a de Julio 2016

Ĉeestantoj: Amri Wandel, Jehoŝua Tilleman, Matilda Landaŭ, Dror Gaon, Ŝlomo Ŝaĥar, Eldad Salzman, Doron Modan, Gabi Zeevi. Gasto: Ŝoŝia Beer-Dotan

La unua estrar-kunveno - lunde - en la nova klubejo – WIZO, Domo de Gepatroj, Tel Aviv.

Protokolo de la antaŭa kunsido (7-a de Junio 2016) – ĉu estas rimarkoj?

Jes: Ŝlomo plendas, ke la protokolo(j) ne alvenas sufiĉe antaŭ la kunsidoj, por ke ĉiuj povu aldoni siajn korektojn, ŝanĝi antaŭ la fina, dissendita versio. Amri: klarigas la kaŭzojn. Gabi: promesas klopodi venontfoje.

1. Nova klubejo

a) Miĥal volas ĉesi la gvidadon de la Klubo, pro personaj kaŭzoj kaj la troa premo de la devo ĉiusemajne prizorgi programon. Ŝia propono: malpli ofte kunveni, eventuale ĉiun duan semajnon. Propono de Amri kaj aliaj: la klubgvidanto(j) ne faru programojn ĉiusemajne, estu rete dissendita anticipa informo al la membraro antaŭ ĉiu kunveno pri la eventuala programo. La kunvenoj plu okazu ĉiusemajne, kaj en la “senprogramaj” kunvenoj okazu libera renkontiĝo. Jehoŝua: ni devas sciigi la membraron en pozitiva sinteno, ne skribi, ke “ne estas programo”, sed emfazi la eblecon pri amika kunveno, uzado kaj praktikado de la lingvo. *Voĉdono: unuanime akceptita!*

b) Jehoŝua: la kontrakto kun WIZO estas subskribita, la unua monato pagita (disdonas kopion por spekti). Propono: ni devas demonstri ĉeeston – la aŭgustfina renkonto estu ĉi tie! *Akceptite.* Lia propono pri plia kunveno, meze de aŭgusto: *plimulto ne subtenas.*

c) Plia klubgvidanto estas serĉata (anstataŭ Miĥal, se ŝi vere ne plu volos resti, apud Eldad).

2. Raporto pri la KD de Ŝoŝia/Amir

a) La disko eldoniĝis, estos vendado dum UK (vendoprezio: 12 eŭroj). Dum la LK jam estis venditaj kelkaj po 50 sikloj. Restis ankoraŭ pagdevo al la presejo (800 NIS, eble +VAT).

b) Propono de Ŝoŝia pri TV-programo: Ŝoŝia aĉetis serion da elsendoj de interreta radio/televido. Restis ankoraŭ 10 elsendoj, jam sufiĉe programplenaj. Ŝi gvidas. Estas 50 minutaj interparoloj kun personoj el la kultura medio. Restas ankoraŭ loko por iu(j), kiu(j) povus prezenti, popularigi Esperanton. Estas bezonata tia volontulo en la tel-aviva regiono. La elsendo videblos ankaŭ en Youtube. La partoprenanto devos pagi 195 siklojn, Ŝoŝia mem pagas la samon.

Voĉdono: la estraro apogas la ideon, ELI pagos la koston (unuanime)

3. Financoj (Ŝlomo)

a) Responda letero al la Administranto pri Societoj (רשם העמותות) – pri nia intenco uzi nian kapitalon por aĉeto de propra oficejo. Ŝlomo sendu la leteron. *Voĉdono: unuanime akceptita!*

b) Aĉeti oficejon – jam decidita en la pasinteco! Amri: ni serioze devas klopodi! *Matilda: kontraŭ.*

c) Vojaĝelspezoj por estrarkunsidoj: kelkaj jam transdonis la formularon. Propono de Doron: ni redonu nur la benzin-kostojn.

2/...



Ŝlomo kontraŭas: Ni ne povas fiksi arbitran prezon, kiam la tutlanda oficiala ĝenerala kalkulo baziĝas al la tabelo de Ĥeŝev. Plie: la elspezo estas ne nur por la benzino, sed ankaŭ por asekuro, rutinaj servoj ktp. *Voĉdono: la propono de Ŝlomo estas unuanime akceptita.*

ĉ. Propono de Ŝlomo pri maniero decidi pri elspezoj (sendita al la estraranoj antaŭ du monatoj, skribita sur la tabulo pasintfoje). La esenco: pli libere kaj senburokrate pritrakti la elspezojn, kondiĉe ke ili restas en la kadro de la anticipe decidita buĝeto.

Voĉdono: 5 por, 1 sindeteno.

4. Memorlibro pri Josi (Amri - rakontas pri la detaloj de la laboro)

- a) La formato fine estos B5 (kiu estas inter A5 kaj A4).
- b) Estos en ĝi tri partoj: memoroj, artikoloj de Josi, judaj ŝercoj – entute ĉ. 350 paĝoj (parte en koloroj, ĉefe pro la fotoj).
- c) Amri, kiel redaktoro, dankas al ĉiuj kiuj partoprenis en la granda laboro kaj ĉiuj kiuj helpis per siaj konsiloj kaj rimarkoj.

5. Salutanto por la UK en Nitro

Jehoŝua laŭlegas la liston de la ĉi-jaraj israelaj partoprenantoj (11 homoj). Cvi salutis pasintjare, Enrica decidis ne veturi kvankam aliĝinta, iuj ne volus aŭ ne taŭgas. Propono: Gabi salutos - *unuanime akceptita*. Amri kaj Jehoŝua preparos la tekston.

6. Dratverejo kaj oficejo (Jehoŝua)

- a) Nova luanto estas trovita – sed ŝi, policistino kun filino – volas pritrakti la proponitan kontrakton, kaj fari ŝanĝojn en la kondiĉoj. Propono de la Estraro: ni ne akceptas ŝiajn ŝanĝojn, kaj sciigos ŝin pri tio.
- b) La nuna loĝantino, la vidvino, komencis fari malfacilaĵojn, i.a. ŝi ne emas forlasi la loĝejon antaŭ la fino de la kalendara jaro, volas alporti plian kunloĝantinon (parencon) por la plena prezo, ŝia filo, kiu helpis nin antaŭe, nun ankaŭ ŝajniĝas “ne kompreni” – kvankam tio estas precize fiksita en la kontrakto kaj subskribite far ili!

Gabi: La anonco restos ankoraŭ du semajnojn. Ni vidis, ke eblas luigi tuj, se la loĝejo estas vaka. Propono: La advokato devas sendi minac-leteron al la loĝantino, ke ŝi forlasu ĝis la 1/9/2016, aliel ni funkciigos la garanti-ĉekojn de la ŝia filo, kaj pliajn paŝojn. (*Unuanime!*)

Somerfina renkontiĝo: lunde, la 29-an de aŭgusto, en la nova klubejo.

La venonta kunsido: lunde, la 5-an de Septembro 2016, je 19:30

Protokolis: Gabi Zeevi